

Reformo de la esperanto-instruado, 6-a parto
Claude Gacond, 181-a radioprelego, 1967.03.29 & 1967.04.01

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En nia serio de prelegoj dediĉitaj al la instruado de nia lingvo ni plurfoje asertis, ke la lernolibroj pretigas al pasiva kono de la lingvo. La aktiva parola uzo ne estas instruata, kio kondukas tro ofte la esperantistojn kutimiĝi al sia persona dialekto.

A.- Tiu situacio ne povas daŭri. Hodiaŭ multaj esperanto-instruantoj serĉas novan metodologion kapabla instrui frazstrukturojn, kiuj konduku la lernantojn al pli rapida parola uzo de la lingvo.

Cl.- Mi volas hodiaŭ prezenti la verkojn de Andrzej Pettyn, unu el la esperanto-instruistoj, kiuj plej pozitive kontribuas al la repenso de la esperanto-instruado.

A.- Aperis en 1965 lia verko titolita *Novaj tendencoj en la instruado de esperanto* kaj la sekvan jaron lia lernolibro titolita *Esperanto-konversacioj*. Tiuj du verkoj de Andrzej Pettyn estas ja redaktitaj por la pola publiko, tamen ili povas helpi la instruistaron en la tuta mondo.

Cl.- Ili proponas instruadon de esperanto per dialogoj. Tiuj dialogoj devas konstrui ĉe la lernantoj refleksojn absolute necesajn al la parola uzo de esperanto.

A.- Andrzej Pettyn prave asertas, ke la instruadon de la parolata lingvo oni devas komenci jam ekde la unuaj lecionoj. Lia metodologio baziĝas sur la studoj de la psikologoj pri la lernado kaj science respondas al multaj deziroj de la esperanto-instruistaro.

Cl.- Parolante ni tre ofte uzas vort-kombinojn, kiuj ŝajnas al ni **novaj**. Nova signifas por ni, ke ĝis tiam ni ne aŭdis aŭ ne prononcis tiujn vortojn. Tamen niaj paroloj estas ĉiam konstruataj **analoge** al la paroloj, kiujn ni jam plurfoje aŭdis aŭ ripetis.

A.- La instruado devas doni kiel eble plej multe da fraz-strukturoj al la lernantoj. Tiuj strukturoj devas fariĝi automataj refleksoj. Tiuj refleksoj ebligas tiam aŭtomate kaj analoge, sen cerbumado, formi aliajn frazojn.

Cl.- La kursa konversacio devas instrui fraz-modelojn. La gramatikaj reguloj ne devas veni antaŭ la akiro de la refleksoj pri fraz-strukturoj, sed devas kiel eble plej ofte sekvi tiun akiron.

A.- La lernolibro de Andrzej Pettyn prezentas mallongajn dialogojn, kiuj rilatas al plej diversaj realaj situacioj. Kiam frazmodelo estas parkerita, tiam oni ŝanĝas vortelementojn konservante la gramatikan enhavon.

Cl.- La fraz-modeloj devas esti tiel konstruitaj, ke oni praktike eliminu la eblon fari gramatikan eraron. Ĉar kiel ni jam asertis dum pluraj prelegoj, la eraroj nenion instruas, ili nur gravuriĝas en la subkonscio kaj kondukas al malbonaj refleksoj.

A.- Kiel ekzemplon ni prenu facilan dialogon. Aŭdu :

Cl.- *Ĉu vi intencas iri al kafejo ?*

A.- *Jes, mi intencas !*

Cl.- *Kiam ?*

A.- *Morgaŭ !*

Cl.- Tiu simpla dialogo povas fariĝi : *Ĉi vi intencas iri al kinejo ?*

A.- *Ĉu vi intencas iri al teatro ?*

Cl.- *Ĉu vi intencas iri al koncertejo ?*

A.- *Ĉu vi intencas iri al operejo ?*

Cl.- Al la demando *Kiam ?* oni povas respondi : *Hodiaŭ ! Lunde ! Marde ! Merkrede ! Ĵaŭde ! Vendrede ! Sabate ! Dimanĉe !*

A.- Anstataŭ respondi : *Jes, mi intencas !* oni povas respondi : *Ne, mi ne intencas !*

Cl.- Eblas anstataŭi *iri* per aliaj verboj : *forveturi, kuri, aŭtomobili*, tiam oni ricevas ekzemple :

A.- *Ĉu vi intencas forveturi al Hamburgo ?*

Cl.- *Jes, mi intencas !*

A.- *Kiam ?*

Cl.- *Ĵaŭde !*

A.- La kursanoj per tiuj dialogoj estas aktivaj. La instruanto ĉesas ludi la ĉefan rolon. Eĉ magnetofono povas lin anstataŭi kaj diapozitivaj povas vekti situaciojn. Ni tiam ekestas en lingvolaboratoria etoso.

Cl.- Sed simpla grupiĝo de la lernantoj ĉirkaŭ la kursgvidanto ankaŭ sufiĉas. Tekniko ne devas komplikigi la instruadon. Kontraŭe ĝi devas ĝin riĉigi, helpi.

A.- Ofte en la kluboj oni ne scias, kion fari. Tiam oni tendas la grupanojn per gramatikaj klarigoj, kiuj fakte plibonigas nenies paroluzon. Kial ne ĉerpi el la verko de Andrzej Pettyn *Esperanto-konversacioj* kaj imagi aliajn dialogojn kaj aliajn situaciojn ?

Cl.- Kaj en la kursoj mem, mi esperas, ke ekde la venonta sezono 1967-1968-a tiu instruado per dialogoj okupos ĉiam kreskantan lokon. Dum ne ekzistas eldonoj de *Esperanto-konversacioj* adaptitaj al la diversaj naciaj lingvoj, la pola eldono tre bone taŭgas, se oni ŝanĝas la proprajn nomojn. Anstataŭ diri :

A.- *Alina Kowalska, Barbara Sierakowska aŭ Tadeo Zajackowski*

Cl.- oni diru :

A.- *Alina Müller, Barbara Gerber aŭ Johano Ackermann*, se oni apartenas al la germana popolo.

Cl.- La kursgvidantoj kaj grupestroj havu iom da imago kaj iniciato.

A.- La uzo de la pola lernolibro *Esperanto-konversacio* en plej diversaj lingvosferoj ebligas interesajn elprovojn. Oni rimarkos, kiaj dialogoj mankas, kaj iom post iom internacia eldono povos aperi.

Cl.- Por la franclingvanoj multaj dialogoj devos celi bonan uzon de la akuzativo kaj bonan komprenon pri la subjekta funkcio. Ni devas konduki niajn franclingvajn lernantojn diri : *Jes, alvenas la buso !* kaj ne *Jes, alvenas la buson !* Kie la klasikaj lernolibroj fiaskis, la konversacio science gvidata devas sukcesi. Ĝi ja sukcesas por instrui lingvojn kiom pli malfacilajn, ol esperanto.

A.- Tiuj dialogoj devas konduki al lernado de facilaj skeĉoj, kaj al ludado de teatraĵetoj, kaj ankaŭ al improvizado de konversacioj. Sed tiun gradon oni atingu nur kiam la kursanoj sisteme asimilis la lernolibrajn dialogojn. Kiu volas iri tro rapide, tiu metas la lernantojn en situaciojn, kiuj kondukas al eraroj.

Reformo de la esperanto-instruado, 6-a parto
Claude Gacond, 181-a radioprelego, 1967.03.29 & 1967.04.01

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-